



Valencilando: koruptado demisiigas prezidanton

Unuiĝintaj nacioj:
La jarcento de la virino


Publika transporto
Bileto al kontraŭleĝeco

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...



Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Serio Stafeto n-ro 33

Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 714 g, 624 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-39-3; prezo ĉe FEL 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Koruptado demisiigas prezidanton

8



En julio demisiis la prezidanto de la Valencio Aŭtonoma Komunumo Francisco Camps. Nur fine de majo li ricevis sian trian mandaton per pli ol duono de la voĉoj. Tamen jam de la komenco de 2009 Camps estis juĝe enketata pro subaĉeto. Meze de julio li estis oficiale akuzita pro akceptado de pli ol 14 000 eŭroj da donacoj.

La jarcento de la virino

14



Bileto al kontraŭleĝeco

19

En periodo, kiel la nuntempa, de „malgrasaj bovinoj”, oni certe malemas akcepti pliigon je 50 % de la prezo de publika transporto.

Tio tamen okazis tuj post la somero en Milano, Italio, kies nova urbestro Giuliano Pisapia (maldekstrulo) tiele dispoziciis por replenigi – post plurjara dekstrula administrado – la komunuman kason.

Paradokse estas, ke en Italio, dum la maldekstro streĉas sian rimenon, la dekstro fariĝis abrupte solidarega.

politiko

VALENCILANDO	8
Koruptado demisiigas prezidanton	
NIGERIO	11
Prezidanto ne plu bonŝanca	
BRAZILIO	11
Figuroj malaperintaj	
BRAZILIO	12
Parlamento korupton apogas	
EUROPA UNIO	13
En krizo mankas kuraĝo	
BELGIO	13
Voĉoj kontraŭdiraj	
UNUIĜINTAJ NACIOJ	14
La jarcento de la virino	

moderna vivo

NIGERIO	15
Horaro-hororo	
USONO	15
Rio-granda stimulado	
ALBANIO	15
Tragedio en teatro	
MUZEOJ	16
Verda vojo	
NARKOTAĴOJ	16
El Paco al paco	
FERVOJOJ	17
Trajnojn trak-tante	
ESEO	18
Rekte interrete	
PUBLIKA TRANSPORTO	19
Bileto al kontraŭleĝeco	
ARKEOLOGIO	19
Rubo de la romianoj	
SPORTO	20
Pilka pasio	
GREKIO-ALBANIO	20
Ĉe la limoj de pacienco	
GRIMPADO	21
Kiam montopado fariĝis mortopado	

ekonomio

ALBANIO	22
Riĉa tero, malriĉa popolo	
HISPANIO	23
Ne pagi por ne ŝuldi	

libroj

Mafio plu klarigenda	24
Sciencfikcia verko iom leginda	25

enigmoj

Solvo de la duobla laboro (Monato 07/2011)	26
Silaba enigmo	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

> Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

> Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Bosnio-Herc.	BAM	50	55	30	11	18
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlandio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

> aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstro:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: aon.913548977@aon.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Ed. Van-âncio III, Sala 303 70393-902 Brasília (DF) Reto: bel@esperanto.org.br
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arnecasper@dbmail.dk.
- > **Estonia:** Ahto Siimson, Kastani vk.12-11, Paikuse alev, Pärnu maakond, EE-86602. Reto: ahto.siimson@esperanto.ee.
- > **Finnna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: cafofficejo@esperanto.fi
- > **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: info@esperanto-france.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanner, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanner@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@Esperanto-ct.org.
- > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villaresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860. Reto: esperanto@saluton.net.

- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250, Escazú. Reto: miaumiau@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Poŝtel.: +371 26407174. Reto: margarita.zelve@gmail.com
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.178, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvegia:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: info@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina Gorecka, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando. Reto: sezonoj@kanet.ru.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Titova 6-24 606211 Lis-kovo, Nijhegorodskaja obl., Ruslando. Tel.: +7 83149-54961. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.008 4867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
 - > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: stano.marcek@gmail.com.
- > **Slovenaj:**
 - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill, Bower Road, Wynsborg, 7800. Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svarthvicksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå, Svedio. Reto: leif.holmlund@telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, 1500 Park Ave, STE 134, Emeryville, CA 94608. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: eusa@esperanto-usa.org

Investo

En Eŭropo la longa ferio periodo finiĝis, same kiel la somero. Ĉiujare en tiu tempo mia financa kolemino Gerd Jacques eniras mian modestan oficejon kaj suspire demandas „Kion ni faru pri la kotizoj venontjare?” Tiu unusola frazo estas la kompakta sintezo de dekoj da demandoj ŝiaj ... Demandoj kiel „Ĉu la paperprezoj draste altiĝos en 2012?” „Ĉu la poŝtoservoj ekde la unua de januaro denove subite kaj senaverte altiĝos siajn tarifojn per 20 %?” „Ĉu la kurzo de la japana eno – per kiu pagas sian kotizon ne multaj abonantoj – ĉu tiu kurzo plu renversos nian buĝeton?” „Kaj kio pri la usona dolaro?” „Ĉu denove pluraj abonantoj transiros de la papera versio al la reta?”. Pri ĉiuj tiuj demandoj ŝi ne havas respondon, kaj ŝi senespere atendas miajn konsilojn pribuĝetajn.

Sed mi, mi respondas ĉefe ŝultroleve, neniel konsile ... En tiuj ĉi

ekonomiaj malstabilaj tempoj eĉ la specialistoj de la grandaj bankoj ne povas sencohave ion prognozi. Kiel ni, eldonistoj de la malgranda MONATO do povus? Nu, unu afero pli-malpli certas: la prezoj en la mondo ne subite draste falos. Do redukti la kotizon de MONATO estus erara decido. Ĉiu scias ja, ke la inflacio daŭros. La demando estas nur „per kiom da elcentoj?”

Ni decidis ĉi-jare esti optimismaj, kaj altigi la kotizon nur treege etete. Kvazaŭ simbole nur. Per kiom da procentoj vi vidos venontmonate en paĝo 4. Ĉu venontmonate? Jes, ne ankoraŭ nun, ĉar ni volas per niaj modestaj rimedoj doni al vi la eblon kontraŭbatali la inflacion. Rigardu en paĝo 4 de tiu ĉi numero, kiom la kotizo estas nun por via regiono, kaj pagu laŭ ĝi nun por unu, du, kvin aŭ eĉ por deko da jaroj. Unu fakto certas. La kotizoj ne falos estonte. Do nun kotizi por pluraj jaroj estas la plej perfekta inves-



to. Tian rendimenton via ŝparkonto aŭ viaj obligacioj ne donos al vi!

Ne gravas, ĉu vi kutimas pagi rekte al la eldonejo, aŭ tra iu loka peranto. Gravas ke vi rekotizu nun, antaŭ la apero de la novaj tarifoj de 2012. Via monujo vin benos!

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: info@fel.esperanto.be, Skypetelefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernti: http://flandra_esperantoligo.ipernity.com

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

teknika redaktoro:

Christina Schwarzenstein

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- Arto: Claude Nourmont-Moon, 2 Om

Klappchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellan-gasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schaliehoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg

Rete: lingvo@monato.net.

- **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

- **Scienco:** Krys Williams, 95 Tynybedw Terrace, Treorci, RCT CF42 6RL, Britio. Rete: scienco@monato.net.

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porze-llangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Pri UEA kaj BOOZ

La vidpunkto *Lingvo aŭto-didakta* (MONATO 2011/8-9, p. 7) estis interesa. Dum jaroj estis malsimilaĵoj en la sistemoj en la ŝtatoj en Aŭstralio. Nur unu fojon tio estis afero de la tuta lando, kiam oni decidis, ke la tri komenciliteroj montru la ŝtaton. Grupo de esperantistoj surpriziĝis, kiam ili vidis en Okcidenta Aŭstralio la ciferplaton UEAXx. Kaj en Kanbero iu ricevis la platon YAH ooo.

En Nov-Sud-Kimrio (NSK) estis nigraj literoj sur flavaj platoj. Pro tio amiko, kiu havis ege elegantan italan aŭton, elektis registri ĝin en Viktorio, kie la platoj havis blankajn literojn sur nigraj platoj. Tamen ankaŭ en NSK la koloro de la plato povas esti laŭ la volo de la posedanto; mi vidis bluan (sur blua aŭto), rozan (sur rozkolora aŭto) kaj eĉ rozetan. Tiu lasta estis sur blanka aŭto. Krom la 3-litera-plus-3-cifera formo, nun en Nov-Sud-Kimrio estas aliaj formoj. Du literoj kun kvar ciferoj, kaj la plej nova estas du literoj, du ciferoj kaj du literoj. Pro tio, se la du ciferoj estas oo, multaj (ofte azianoj) uzas tiun metodon por indiki la proprajn familinomojn.

Interese estas rigardi ankaŭ la telefonnumerojn sur ŝarĝaŭtoj. Komercistoj povas elekti la propran kodon por siaj telefonoj kun ciferoj, kiuj rilatas al la nomo de la firmao. Likvorvendisto uzas la numeron 8002, kiu povas esti legata kiel BOOZ (slange angla por „drinkaĵo“).

Margaret Chaldecott
Aŭstralio

Egalrajtaj civitanoj

En *Antaŭ 30 jaroj* (MONATO 2011/08-09, p. 13) Bardhyl Selimi skribis: „En la tiama Jugoslavio albanoj, konsiderataj duagrada civitanoj, ...“, kio tute ne estas vera. En la tiama Serbio kaj Jugoslavio, albanoj estis konsiderataj kiel egalrajtaj civitanoj, kaj ili estis ofte sur tre gravaj pozicioj en politiko kaj ekonomio. Ili estis favoratoj.

La tiama Serbio kaj Jugoslavio multe faris por la sukceso de Kosovo kaj Metohio, ja la tieaj albanoj havis la plej grandan naskiĝkvanton en Eŭropo. Kiam albana familio ricevis sian dekan infanon, tiam prezidanto Tito iĝis ĝia „honora baptopatro“. Krome Serbio akceptadis ĉiujn albanojn, kiuj fuĝis

el Albanio, pro la reĝimo de Enver Hoxha.

Atanasije Marjanović
Serbio

Poezio

Gratulojn pro la aŭgusta-septembra numero de MONATO. Mi opinias, ke ĝi enhavas pli da diverstemaj artikoloj ol pasintaj numeroj de la kuranta jaro. Mi petas vin krome, bonvolu decidi pri la revenigo de la rubriko „Poezio“. Ĝi estas bezonata por nia ŝatinda revuo.

Abbas Momeni
Irano

Tro longdaŭra monarkio

Aperis granda eraro pri Hungario, t.e. la monarkio Aŭstrio-Hungario (MONATO 2011/10, p. 11).

En la komenco de la artikolo – pri la forpaso de Otto von Habsburg – estis skribite: „... liaj antaŭuloj, kiuj regadis la monarkion Aŭstrio-Hungario dum preskaŭ 650 jaroj.“ La monarkio ekzistis inter la jaroj 1867-1918, do tute ne dum jarcentoj.

Eva Baloghné Fodor
Hungario



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigas vin?


Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.



La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualizaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en Monato. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de Monato.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Bonvenon al nova studjaro

Paul GUBBINS

Aŭtuno. Sezono, almenaŭ en la norda duonsfero, kiam centmiloj da studentoj komencas novan studjaron ĉe siaj universitatoj. Jen ofte la unua fojo, ke ili forlasas konatan, relative sekuran hejman etoson, kie ili pasigis ĝis nun verŝajne la tutan vivon.

Nun, sursojle al adolteco, ili eniras strangan, pli larĝan mondon. Atendas novaj amikoj, novaj spertoj, novaj studfakoj. Tiam ili lernas gravan lecionon, ne instruitan dum la lerneja klaso pri biologio: ke en la vivo fiŝego rapide fariĝas fiŝeto.

Alivorte, la memfidaĉa, aroganta abituriento, ĉepinte en sia lernejo, fariĝas en sia nova universitato neniulo inter centoj da aliaj neniuloj. Ĝenerale, evidente, la fiŝeto travivas, kreskas, fariĝas denove, fine de la studoj, fiŝego – ĝis komenciĝas la profesia vivo kaj la iama universitata fiŝego fariĝas nun laboreja fiŝeto.

Politikistoj kaj edukistoj pozitive taksas universitatan studadon. Ili diras, ke bone edukitaj homoj, kun mensoj trejnitaj, pli efike, pli flekseble, kontribuos al la ekonomio. Nepras inĝenieroj, kemiistoj, financistoj, kiuj oleumos la radojn de industrio kaj socio, tiel kontribuante al la malneta enlanda produkto.

Aliflanke, ili aldonas, universitataj diplomitoj statistike vivas pli longe, pli kontente kaj pli sane. Tio, kion ili ne aldonas, estas, ke tiu, kiu studas, ne kalkuliĝas inter la vicoj, pli kaj pli longiĝantaj, de senlaboruloj.

Almenaŭ ne ĝis post la studado, kiam, en nunaj kriziĝantaj okcidentaj ekonomioj, mankas konvenaj postenoj. Studentoj, trompitaj pro promesoj, ke diplomo kondukos al pli alte salajrata laboro, trovas, ke akiri tian

postenon pli kaj pli malfacilas.

Rezulte, la studentoj postulas plej bonajn notojn por „brili“ inter aliaj labor-serĉantoj. Foje ili tre honestas: venas al mi en mia universitato studentoj, kiuj diras: „Mi deziras unuaklasan diplomon. Bonvolu tralegi ĉi tiun proveseon kaj indiki, kiamaniere mi povas ĝin plibonigi, por ke mi akiru la plej altan noton.“

Rimarku: ne temas pri tio, ke mi diskutu aŭ konsilu, por ke la petintoj lernu, mem esploru pli vaste la temaron. Temas pri kruda, komerca avantaĝo en la labor-merkato.

La honeston mi admiras: ne, tamen, la intelektan ĉarlatanecan. Vere elstara studento ne devas tiel kliniĝi: tiu posedas la mensan kapablon originale, sendepende esei. Nur dua-, triarangulo tiel senĝene petas – kaj tiaj tro ofte troviĝas en la nunaj universitatoj.

Leviĝas do la demando, ĉu valoras instrui universitat-nivele tiom da studentoj. En la pasinteco eblis fariĝi advokato, ĵurnalistoj, arkitektoj – almenaŭ ekzemple en Britio – por ne paroli pri flegistoj, aktoroj aŭ fotistoj, sen universitata diplomo: necesis plurjara „enpostena“ trejnado kun, ĝenerale, finaj

profesiaj ekzamenoj.

Certe, inter la centmiloj da studentoj, kiuj nuntempe komencas sian studadon, estas dekmiloj, al kiuj pli taŭgus praktika „enpostena“ trejnado, aŭ eĉ du-jara kurso ĉe teknika supera lernejo, ĉe faka instituto, anstataŭ teoria tri- aŭ kvar-jara studado ĉe universitato.

Nepras ankaŭ demandi, ĉu restas kontentiga la nivelo de universitataj studoj. En Britio pli da studentoj ol en la pasinteco akiras unuaklasajn diplomojn. Antaŭ kelkaj jaroj, ĉe iu universitato, pli ol 50 % de la studentoj en unu fako estas klasifikitaj unuagradaj. Tia noto-inflacio infektis multajn universitatojn, kiuj nun komprenas, ke, se notinda elcentaĵo da studentoj ne ricevas la plej altajn gradojn, la klientoj – pardonu, la studentoj – portos siajn monujojn al la konkurenco, kie oni varbas per promesoj pri riĉaj rikoltoj da unuagradaj diplomoj.

Evidente, malfacilas kompari la nunajn universitatojn, kiuj instruas plimulton, kun la superaj lernejoj de la pasinteco, kie nur elita minoritato, monhava kaj privilegiita, studis en preskaŭ kluba etoso. Reiri al tiaj tempoj neniel dezirindas.

Tamen necesas reekzameni la koncepton „universitato“. Ĉu tiel eduki tiom da homoj? Ĉu eblas garantii kvaliton? Ĉu ekzistas fakoj, kiuj pro esence praktika emfazo ne meritas universitatan studadon?

Fine, ĉu eblas nomi instituton „universitato“, se inter ties studfakoj ne listiĝas, ekzemple, fiziko, filozofio – aŭ modernaj fremdaj lingvoj? Kio do estas, kaj estu, universitato en la jaro 2011? ■



Centmiloj da studentoj komencas novan studjaron ĉe siaj universitatoj.

Koruptado demisiigas prezidanton

En julio demisiis la prezidanto de la Valencia Aŭtonoma Komunumo Francisco Camps. Nur fine de majo li ricevis sian trian mandaton per pli ol duono de la voĉoj. Tamen jam de la komenco de 2009 Camps estis juĝe enketata pro subaĉeto. Meze de julio li estis oficiale akuzita pro akceptado de pli ol 14 000 eŭroj da donacoj.

Camps estos juĝata, kio ebligas nenium alian eliron al li kaj al lia partio, la Popola Partio, krom lia demisio kaj anstataŭigo per sampartiano. La spektaklo de la prezidanto de aŭtonoma komunumo kiel akuzato pri koruptado en juĝejo, kaj eventuale kondamnata, forte malhelpus la ambiciojn de la Popola Partio venki en la tre baldaŭaj hispanaj balotoj.

Paradokse, Camps atingis en 2003 la prezidantecon de Valencilando parte pro skandaloj pri koruptado, kiuj tuŝis la antaŭan sampartian prezidanton, Eduardo Zaplana. La promocion de Camps kaj la flankeniĝon de la politika sektoro de Zaplana en la partio kaj publika administrado oni prezentis kiel renovigon de la valencia politika vivo. Tamen skan-

daloj kaj juĝaj enketadoj pri koruptado konstante sekvis lin tra la lasta jardeko.

Marbordo

Tiu koruptado estis tre helpata de la spekulacia piramido pri nemoveblaĵoj, kiu kreskadis en Hispanio en la lastaj du jardekoj. Ekzemple, inter 2001 kaj 2004 oni konstruis laŭlonge de la valencia marbordo pli ol estis konstruita ĝis tiam dum la tuta daŭro de historio.

Instigis spekulacion la politika klaso, kiu vidis en ĝi miraklan rimedon, per kiu politikistoj ŝajnigis ekonomie sukcesan agadon. Samtempe ĝi permesis mirindan kreskon de la buĝetoj de la urbaj komunumoj. Fakte, sufokaj estis la premoj de grandegaj spekulaciaj investgrupoj, por ke oni permesu la konstruon de vas-

taj domaroj en lokoj, kie konstruado ne estis permesata.

Ili estis praktike ne kontraŭstareblaj por malgrandaj municipoj kun kelkcentoj aŭ eĉ kelkmiloj da loĝantoj. Krome, la facila mono senĉese ricevata de la strukturaj fondusoj de Eŭropa Unio donis enormajn monrimedojn, kiuj plipufigis la kartodomon.

Montajdo

Aparte vetis en tiu ludo diversaj mediteraneaj aŭtonomaj komunumoj, kiel Valencilando kaj Balearoj. Sed la montajdo helpis ankaŭ al neleĝa lukrado kiel de la politikaj partioj, kiuj alfrontas multenombrajn kaj ĉiam pli multekostajn politikajn kampanjojn, tiel ankaŭ de politikaj estroj mem.

Ekzemple, la eksa prezidanto de Balearoj inter 2003 kaj 2007 Jaime Matas, ankaŭ de la Popola Partio, evitas karceron pro koruptado danke al kaŭcio de tri milionoj da eŭroj. Simile alfrontas diversajn procesojn pro koruptado pluraj estroj de Majorka Unio, la partio reginta en Majorko inter 1995 kaj 2007, danke al sia ŝlosila situo inter la dekstra hispanisma Popola Partio kaj la maldekstraj balearismaj partioj.

Tio puŝis *Majorkan Union* al la refondiĝo en februaro 2011. Entute 42 publikaj postenuloj de la baleara registaro dum la regado de Matas estas persekutataj, inkluzive de li mem kaj pluraj ministroj. Tio tamen ne malhelpis, ke ankaŭ en Balearoj la Popola Partio refoje ricevis absolutan plimulton en la



Francisco Camps: ricevinte mandaton en ĵusaj elektoj, li tamen estas demisiigita.

majaj elektoj al la baleara parlamento.

Konverĝo

Tiel aperis danĝera konverĝo de intereso inter spekulaciaj grupoj, politikaj grupoj kaj personaj intereso de politikistoj kaj administraciistoj. Sekve koruptoskandaloj tuŝas praktike ĉiujn politikajn partiojn kaj aŭtonomajn komunumojn en Hispanio, kvankam proporcioj malsimilas inter unuj kaj aliaj.

La spekulacia piramido nutris sin ankaŭ per malaltaj bankaj interezoj. En la hispana kreditmerkato elstare rolas ŝparkasoj. Tiuj ŝparkasoj nuntempe trairas kernan reorganizon, postulitan de Banko de Hispanio kaŭze de la monda ekonomia krizo, tamen ĝis antaŭ kelkaj monatoj ili estis grandparte dependaj de la regionaj kaj provincaj registaroj. Tiel ĉi, unuflanke, tiuj registaroj plifaciligis al si la financadon de siaj projektoj kaj, aliflanke, disponis pri tre mondonaj postenoj por distribui inter siaj protektatoj.

Pro tio la kazoj de amasa misuzo de mono en ŝparkasoj abundas. Elstaras la kazo de la *Ŝparkaso Mediteranea*, kun la sidejo en Alakanto, la dua urbo de Valencilando, kaj pli ol tri milionoj da klientoj, kiu iam estis la kvara ŝparkaso en Hispanio. Meze de julio, sur la rando de ĝia bankroto, la Banko de Hispanio ŝtatigis ĝin kaj anoncis la investon de 2,8 miliardoj da eŭroj da kapitalo kaj pliaj tri miliardoj da likvidaĵo.

Ludparko

Tiu ŝparkaso abunde financis diversajn agadojn de la valencia registaro, pruntedonante al ĝi centojn da milionoj da eŭroj. Krom tio ĝi fariĝis, kun aliaj du ŝparkasoj sub la regado de la valencia registaro, la posedanto de la plimulto de unu el la emblemaj registaraj konstruaĵegoj: la ludparko *Mita Tero*. Tamen la projekto praktike bankrotis en 2005. Ne klaras, kiom la ŝparkasoj sukcesos savi el sia investo.

Krom tio, post la ŝtatigo de la ŝparkaso la publiko ekscias tra la gazetaro skandalajn novaĵojn pri persona lukrado de ĝiaj gvidintoj. Ekzemple, ke ili pasintjare altigis siajn salajrojn kaj

premiojn per sumoj eĉ pli altaj ol tiuj, kiujn la ŝparkaso ricevis de la ŝtato por restrukturi sin.

Krom tio, montriĝas, ke dum jaroj tiuj gvidantoj ricevadis pli ol 150 milionojn da eŭroj per personaj kreditoj sub la merkata interezo aŭ eĉ sen interezo. Laŭ ĵurnalismaj informoj ankaŭ elstaraj membroj de la Popola Partio lukris per tiaj kreditoj, kiujn laŭleĝe devus unuope rajtigi la valencia registaro. Ankoraŭ ne klaras, ĉu tiuj rajtigoj okazis.

Kaŭcioj

Aldone, la plej lasta servo de la valenciaj ŝparkasoj al siaj politikaj mastroj estas la pago de la kaŭcioj, per kiuj ili evitas karceron dum multjara procesado. Tiel okazas, ekzemple, por la eksprezidantoj Camps kaj Matas.

Tiuj skandalaj ĵurnalismaj malkovroj aldoniĝas al la konstato, ke tribunaloj grave misfunkcias. Montriĝas, ke juĝenketoj limakas tra koridoroj dum longaj jaroj. Iel la du-jara esplorado de la afero demisiiginta la prezidanton Camps estas escepta. Eblas kompari ĝin kun la diversaj daŭre malfermitaj enketoj kontraŭ la iama baleara registaro aŭ, en Valencilando, kontraŭ Carlos Fabra, la prezidinto de la nord-valencia provinco Castelló de

la Plana inter 1995 kaj 2011.

Ĉe li enketo pri subaĉetado, avantaĝado kaj fiska delikto, kiujn li supozeble faris en 1999, trairis ĝis nun naŭ esplor-juĝistojn kaj kvar prokurorojn, kiuj ankoraŭ atingis decidon nek pri akuzado, nek pri suspendo de la esploro. En Balearoj la eksprezidanto inter 1983 kaj 1995 Gabriel Cañellas evitis karceron pro neleĝa atribuo de grandaj publikaj laboroj nur danke al la preskripto de la delikto. La tribunalo, kiu lin juĝis, deklaris pruvitaj la akuzojn.

Justico

Staras la demando, kigrade la neefikeco de la justico rilatas al ties timo pri eventualaj mispaŝoj, kiam ĝi esploras potenculojn, aŭ ĉu kulpas strukturaj problemoj de la justic-administrado, aŭ, pli grave, kiom konstatebla politika enmiksiĝo malhelpas la senpartian agadon de la justico (pri la influo de politiko en la hispana justico eblas legi en MONATO 2010/6, p. 8-10).

Ne malpli gravas la demando, kial kandidato enketata pro koruptado estas reelektita kiel prezidanto de la valencianoj per komforta absoluta plimulto. Fakte, en la momento de la malfermo de la nova parlamenta periodo, la pasintan



La Palaco de la Artoj, la ĉefa elemento de la komplekso de la Urbo de la Artoj kaj la Sciencoj de Valencio, havis finan koston de 382,5 milionoj da eŭroj.

junion, entute dek membroj de la nova valencia parlamento – ĉiuj de la reganta Popola Partio – estis procesataj, tamen ne formale akuzitaj.

Grandaj projektoj

La valencia Popola Partio elstariĝis per sia inklino al grandiozaj konstruaĵoj ... kiuj, cetere, regule kostas al la registaro dekojn da milionoj pli ol buĝetite. Inter ili troviĝas la menciita ludparkego *Mita Tero*, sed plej famas la eksterordinara komplekso de la Urbo de la Artoj kaj la Sciencoj de Valencio, kies konstruo komenciĝis en 1991 kaj ankoraŭ ne finiĝis.

Ĝia tuta kosto proksimas al miliardo da eŭroj. Krom tio, en la lastaj jaroj la valencia registaro altiris, kontraŭ grandaj kostoj, internacie signifajn eventojn kiel la boat-konkurson *Amerika Pokalo*, en 2007 kaj 2010, kaj la konkursojn de *Formulo 1* sur la stratoj de Valencio ekde 2008. Al tiuj hom-amasaj kaj monmelkaj aranĝoj indas aldoni la viziton de la papo Benedikto la 16a al la urbo en 2006.

Tial ne surprizas la takso de la Banko



Mita Tero, emblema iniciato de la valencia registaro de la 1990aj jaroj, bankrotis en 2005.

de Hispanio, ke Valencilando estas la hispana aŭtonoma komunumo, kiu plej multe ŝuldas: 17,9 miliardojn da eŭroj, kio signifas 17,4 % de ĝia malneta enlanda produkto. Ankaŭ Valencio estas la dua urbo kun la plej altaj ŝuldoj en Hispanio, kvankam laŭ loĝantaro ĝi estas nur la duono de Barcelono, la dua urbo de Hispanio.

Televido

Samtempe la valencia registaro laŭgrade plifortigis sian regadon super la valenciaj televidaj kanaloj. Tio okazis ĉefe en du diversaj manieroj.

Unuflanke, ĝi dum jaroj batalis, por ke katalunaj televidaj kanaloj ne estu spektblaj en Valencilando. Malgraŭ la absurdeco de la afero en la tempoj de Interreto kaj satelita televido kaj malgraŭ la eŭrop-unia direktivo pri „televido sen limoj“, la valencia registaro bazis sin sur hispana leĝo, kiu ĝuste pravigas la fermadon de elsendoj el unu aŭtonoma komunumo en alian.

Male, *Kultura Agado el Valencilando*, kultura asocio por la kataluna lingvo (oficiala ankaŭ en Valencilando), agadis, por ke tiuj elsendoj atingu ĉiujn valenciajn domojn. La publikaj kanaloj el Katalunio estas pli multaj, pli altkvalitaj kaj elsendas ĉiaspecajn programojn nur en la kataluna lingvo.

Tamen en Valencilando la kanaloj uzas plimulte la hispanan kaj fifamas pro sia trivialeco. Fine, post multjara batalo en juĝejoj kaj 720 000 da eŭroj kiel monpunoj (plus interezoj) de la valencia registaro kontraŭ *Kultura Agado*, ekde februaro la kanalojn el Katalunio valencianoj povas spekti nur per interreto.

Pamflettoj

Aliflanke, kaj paralele al tiu akra batalo, la novaĵoj de la publikaj valenciaj kanaloj fariĝis ŝokaj registaraj pamflettoj. Kiel freŝa ekzemplo, iom post la demisio de la prezidanto Camps la registara kanalo elsendis mallongan eksterordinaran novaĵ-bultenon. En ĝi oni bombaste listigis liajn grandajn servojn al Valencilando ... kaj entute forgesis mencii, ke li demisiis.

El la podio de la televidaj novaĵ-bultenoj la Popola Partio disaŭdigadis siajn starpunktojn, laŭ kiuj ĉiujn problemojn de Valencilando kaŭzas jen la socialisma madrida registaro, jen la pankatalunisma barcelona registaro. Montriĝas, ke tiu sinteno trovas fekundan grundon en vastaj tavoloj de la valencia socio.

Ridindeco

Ĉiuokaze, rezulte de la ridindeco de tiuj bultenoj kaj la banaleco de la ceteraj ĉefaj programoj, la valencianoj turnas la dorson al sia televido. Tiel, la tri televidaj registaraj kanaloj sume kunigis en junio nur 6,0 % de la spektantaro, kio estas duono de iliaj rezultoj du jarojn antaŭe.

Konklude, la nova prezidanto de Valencilando, Alberto Fabra, estis elektita de la parlamento la 26an de julio. Kiel lia antaŭulo 12 jarojn antaŭe, ankaŭ li komencis per voko al renovigo de la politika vivo.

Estonece eblos vidi, ĉu plu amasiĝos akuzoj pro koruptado de politikistoj en la juĝejoj kaj ĉu la Popola Partio, malgraŭ tio, plu komforte sukcesos en ĉiuj sekvaj balotoj.

Hektor ALOS | FONT



Marina d'Or estis ekkonstruita en la 1980aj jaroj en la teritorio de vilaĝo kun 2000 loĝantoj. La planoj tuj antaŭ la eksplodo de la konstru-veziko estis, ke ĝi ebligis la loĝadon de 200 000 homoj.

Prezidanto ne plu bonŝanca



Goodluck (esperante: „bonŝanco”) Jonathan

Kiam Goodluck (esperante: „bonŝanco”) Jonathan estas elektita prezidanto en majo 2011, la tuta lando esperplenis. Jonathan estas la unua prezidanto el la niĝerdelta regiono, subpremita de islamaj regantoj dum 40 el la 50 jaroj da niĝeria sendependeco.

El la regiono fluas la riĉaĵojn de la lando, en la formo de nafto, kiu konsistigas 99 % de la tutlanda enspezo. Tamen etnaj kaj religiaj konfliktoj, kune kun korupto, signifas, ke homoj, kiuj ĝis la perforta unuigo flanke de Britio en 1914 pace kunvivis, nun ankoraŭ interbatalas – ĉefe pro nafto.

En 1999 revenis al Niĝerio demokratio. Niĝerianoj esperis, ke sekvos paco kaj prospero, sed tio ne okazis. Eble oni tro esperis, same kiam estis elektita Jonathan – universitata doktoro, tamen el modesta deveno.

Homo malsperta

Nun, tamen, post la unuaj 100 tagoj de la prezidanteco de Jonathan, niĝerianoj opinias, ke eble ili eraris, elektante homon politike malspertan.

Ĉie en Niĝerio okazas sensencaj mortigoj. Ekzemple, en la niĝerdelta re-

giono, militistoj atakas kaj detruas, protestante kontraŭ la tiea neglekto. Rezulte ĉesis nafto-esplorado kaj suferas ŝtataj financoj.

Reagis perforte la registaro, kio malsukcesis. Poste la militistoj ricevis amnestion, kune kun laboro kaj edukado, kaj la situacio en niĝerdelta regiono stabiligis. Eĉ revenis al la regiono nafto-kompanioj.

Religia purigado

Tamen daŭras religiaj kaj etnaj purigadoj en aliaj ŝtatoj, ekzemple Plateau, Kaduna kaj Kano. Tie islamaj fundamentistoj mortigas senkulpajn niĝerianojn el aliaj gentoj aŭ triboj, kiel Igbo aŭ Jorubo.

Lastatempe estis mortigitaj 40 homoj, viroj, virinoj kaj infanoj, en Jos, la ĉefurbo de Plateau. La ŝtato estas dividita inter kristana sudo kaj islama nordo. Tie en la lastaj kvin jaroj mortis miloj da homoj.

Problemo danĝera

La plej danĝeran problemon prezentas la radikala islama grupo Boko Haram. La grupo kontraŭas ĉion okcidentan: edukon, civilizacion, morojn ktp. Ekde majo pereis 5000 homoj pro atakoj de tiu ĉi grupo.

Tiel mesaĝas Boko Haram, ke nenie en Niĝerio sekuras. Sekurecaj servoj timas la islamistojn kaj forkuras, kiam ili atakas. La prezidanto restas senkonsila.

Nun indas montri al Goodluck Jonathan, ke elĉerpiĝis lia bonŝanco – kaj tiu de la niĝerianoj. Nepras, ke li agu, ĉar, ĝis tiam, daŭre fluos ĉie sango.

Princo Henriko OGUINYE/pg

Figuroj malaperintaj

Dilma Rousseff [diŭma rusef] enposteniĝis kiel prezidanto de Brazilo la unuan tagon de 2011. La oficiala foto kunigis ŝin kun la 37 ministroj de la respubliko. Se la foto de la registaro estus hodiaŭa, mankus sur la bildo kelkaj figuroj.

El la sukceso de Lula, la antaŭa prezidanto, rezultis la elekto de Dilma Rousseff sed ne nur. Subtenante la nomon de Lula, formiĝis larĝa kaj peza koalicio por forte bati la opozicion okaze de la balotado de 2010.

Sed baldaŭ montriĝis malfacile al la ĉefino regi tiel diverskoloran ministraron, se konsideri, ke 27 partioj entuziasme partoprenis la kampanjon. Post la venko ŝi malavare pagis la apogantojn per la kuranta mono de la politika mondo, nome postenoj.

Influhava

Antaŭvideble sekvis ministra krizo. Ene de kelkaj monatoj ekŝiĝis kvar ministroj. Inter ili ne eskapis Antônio Palocci [antonju paloĉi], la plej influhava el la ministroj. Ne hazarde troviĝas li sur la oficiala foto maldekstre de la prezidanto, kun la vicprezidanto dekstre.

Pliajn tri ministrojn (pri agrikulturo, transportado, defendo) tuŝis la malmola mano de la sorto aŭ, pli ĝuste, de la gazetaro. Eŝepte de la ministro pri defendo dispelis la aliajn suspektata korupto.

Nun la prezidanto koncentriĝas pri sia ĉefa kampanja promeso: nuligi malriĉecon.

Jozefo LEJC

BRAZILIO

Parlamento korupton apogas

Pri mandatĉesigo de unu el siaj membroj decidis la federacia ĉambro de deputitoj – unu el la du ĉambroj de la parlamento: la alia estas la senato. Jaqueline Roriz [ĵakeline horis], 49-jaraĝa, estas akuzita pri kontraŭleĝa akcepto de mono por la kaso de sia elektokampanjo.

Tamen en aŭgusto, en hontiga sesio, la parlamentanoj ignoris kaj la okulfrapan pruvon pri korupto kaj publikan opinion, tiel ke 265 el la 451 voĉdonintaj parlamentanoj rifuzis aprobi la ĉesigon de la mandato.

Jaqueline Roriz estas filino de Joaquim Roriz [ĵoakin horis], kiu en 2007 rezignis pri sia posteno en la senato, kiam oni denunciis lin pri korupto. En filmo malkovrita de la polico antaŭ du jaroj, Jaqueline aperas kun sia

edzo en kabineto de ŝtata funkciulo, kiu liveras al ŝi paketon da monbiletoj. Eblas spekti parton de tiu filmo en www.youtube.com/watch?v=cSAfEFf6Eqc&feature=related.

Prifraŭdi

La polico konkludis, post plurmonata enketo, ke tiu ago de la deputitino, okazinta en 2006, ligiĝas al vasta reto de korupto, per kiu la tiama registaro de la Federacia Distrikto subaĉetis distriktajn parlamentanojn, por pli facile prifraŭdi la ŝtatan kason.

La deputitino ne neis sian krimon. Por eviti la forigon el ŝia posteno, ŝia ĉefa argumento estis, ke la afero okazis antaŭ multaj jaroj, kiam ŝi ankoraŭ ne estis membro de la federacia parlamento. Ŝajne tiu rezonado ne konvinkis la

partiestrojn, kiuj rekomendis al kolegoj aprobi la mandatĉesigon.

Tamen la voĉdonado estis sekreta, kaj la plimulto favoris ŝin. Oni diras, ke la rezulto estas simptomo de ĉeesto de multaj kaŝitaj kulpuloj en la ĉambro de deputitoj.

Kortumo

Ekde la pasinta jaro validas en Brazilo leĝo, kiu malpermesas, ke homo kondamnita pri krimo kandidatiĝu al politika posteno. Tiu leĝo estas kontestata de kelkaj politikistoj ĉe la plej supera brazila kortumo, kiu ankoraŭ ne decidis pri la afero.

Nun oni timas, ke la sinteno de parlamentanoj povas influi la juĝistojn de la supera tribunalo malfavore al la leĝo, rigardata de la popolo kiel necesa por bari al friponoj la vojon al la politika povo.

La 7an de septembro, nacia ferio en Brazilo, okazis en pluraj urboj publikaj protestoj kontraŭ korupto, kun granda partopreno de junuloj.

Estas interese, ke la kunordigantoj de tiuj manifestacioj ne permesis dum la marŝoj flagojn de sindikatoj kaj politikaj partioj, ĝuste por montri, ke temas pri movado spontanea popola, senpartia.

José Mauro PROGIANTE



Kontraŭ korupto manifestaciis en Brazilo multaj junaj homoj – ĉi tie en la urbo Sao Paulo.

En krizo mankas kuraĝo

Pli kaj pli da politikistoj, kiuj enplektiĝis en la financa krizo en la eŭrozono, viktimiĝas al ĝi.

En Germanio la federacia kanceliero, Angela Merkel, spertis en septembro sesan malvenkon en regionaj balotoj, ĉi-foje en Berlino. Suferis ĉefe la liberala koalicia partnero, kies voĉoj kvaroniĝis. Lasta opinisondado montras, ke jam 80 % de la germanoj kontraŭas Merkel.

Banko

Ŝia politiko rilate la eŭrokrizon estas la ĉefa argumento por la malpopulareco.

La germana federacia banko (*Bundesbank*) pli kaj pli malkaŝe kontraŭas la politikon de la Eŭropa Centra Banko. Ankaŭ tio montriĝas mortiga al la germanaj regantaj politikistoj.

Paralele, ekster Germanio, la krizo kreas politikajn viktimojn. La antaŭaj registaroj en Irlando kaj Portugalio pli frue suferis hontigajn balotajn katastrofojn. En Finnlando, Nederlando kaj Slovakio la influo de kreskantaj eŭroskeptikaj partioj minacas la registaran politikon.

Balotoj

En Hispanio la registaro de la soci-

alisto Zapatero sendube spertos egan malsukceson ĉe la balotoj en novembro. Kaj estus miraklo, se la franca prezidanto Sarkozy estos reelektita en la venonta jaro.

En tia etoso estas evidente, ke politikistoj hezitas proponi drastajn rimedojn por venki la krizon. Neniam en la historio de la monunio tiom mizeris la perspektivo por kuraĝaj politikaj decidoj.

Sen politika unio, la eŭro neniel sukcese daŭros kiel monunuo de Eŭropa Unio.

Ivo DURWAELE

BELGIO

Voĉoj kontraŭdiraj

Se nun okazus balotoj en Belgio, la flandra dekstra partio N-VA kreskus per preskaŭ 7 % kompare kun la rezultoj de balotoj en 2010. Tiel la partio atingus 35 % de la voĉoj en Flandrio.

Tiel ĝi ege superus la duan flandran partion, CD&V (kristandemokratoj) kiu akiris nur 19 %. Tion montras nova enketo de la nacia radio kaj televido kune kun la plej prestiĝa ĵurnalo en Flandrio *De Standaard* [standart] (La standardo).

Diverĝas

N-VA havas la sendependecon de Flandrio en sia programo. Ĝi ne volas revolucion. Sed surbaze de la konstato, ke la vidpunktoj inter francelingvanoj kaj



nederlandlingvanoj pli kaj pli diverĝas, ĝi strebas al tio, paŝon post paŝo, kaj laŭ politika vojo.

Rimarkendas, ke N-VA, post pli ol jaro da vanaj traktadoj pri nova registaro, rezignis partopreni la diskutojn, dum la aliaj partioj nur pene proksimiĝis al interkonsento.

Historio

Tamen nur kelkajn tagojn pli frue publikiĝis enketo de alia flandra ga-

zeto, *Het Nieuwsblad* [niŭsblat] (La novaĵgazeto), kaj televidprogramo de la naciaj elsendoj.

Laŭ la enketo tri el kvar flandroj esperas, ke Belgio ne malaperos, kaj ili fieras pri sia ŝtataneco. Du el tri enketitoj opinias, ke Belgio ankoraŭ ekzistos post 10 jaroj. Aliflanke 30 % pensas, ke tiam ĝi jam apartenos al la historio, sed 42 % nepre ne volas sendependiĝon de Flandrio.

Ivo DURWAELE

UNUIĜINTAJ NACIOJ

La jarcento de la virino

Dilma Rousseff



WIKIMEDIA.ORG

Du historiajn honorojn rikoltis en 2011 Dilma Rousseff [diŭma rusef]. Nacinivele, la 1an de januaro, ŝi enposteniĝis kiel unua ina respublikestro de Brazilo. Internacini-vele, la 21an de septembro, ŝi fariĝis la unua virino, kiu inaŭguris debaton en la ĝenerala asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN).

Parolante en la portugala, Rousseff substrekis la ligan inter virina partoprenado en internaciaj rilatoj kaj firmigo de demokratio.

Genro

Aplaŭdis ĉeestantoj, kiam ŝi diris, ke la nuna jarcento estas tiu de virinoj, kaj ke, en la portugala, vortoj kiel „vida”, „alma” kaj „esperança” („vivo”, „ani-

mo” kaj „espero”) apartenas al la ina genro.

Rilate la nunan ekonomian krizon, Rousseff diris, ke ŝtatoj solidare unuiĝu por ĝin solvi. „La krizo”, ŝi diris, „kreis mondscale jam 250 milionojn da maldungitoj.”

Krome ŝi kritikis militan vojon por solvi internaciajn konfliktojn. Tiaj perfortaj intervenoj, laŭ ŝi, ne nur havas dubindajn rezultojn okaze de historiaj konfliktoj, sed ankaŭ inspiras terorismojn. Aldone, vid-al-vid al la fiasko de militismo, nepras reformi la Sekurecan Konsilion de UN.

Membrigo

Laŭdante la ĵusan membrigon de Suda Sudano en UN, ŝi tamen bedaŭris,

ke ne eblas same laŭdi plenan membriĝon de Palestino. „Brazilo”, diris Rousseff, „jam rekonas la suverenecon de Palestino kaj konsideras tion nepra por pacigi rilatojn inter palestinanoj kaj israelanoj.” Aplaudis denove signifa nombro da asembleanoj.

Memoriginte pri la graveco de internaciaj traktatoj rilate medio-protektadon, Rousseff fermis sian paroladon, atentigante, ke en Brazilo la virino familie ĉefrolas en la batalo kontraŭ malriĉeco.

Fine ŝi laŭdis la iniciatojn de la ĝenerala sekretario de UN Ban Ki-Moon favore al la virinoj. Li lanĉis inan branĉon de UN, gvidatan de la ĉilia eksprezidentino Michelle Bachelet.

Jozefo LEJC

NIĜERIO

Horaro-hororo

Vojaĝi buse en Niĝerio plej danĝeras: eble ekzistas en la mondo neniu pli danĝera lando por pasaĝeroj.

Lastatempe mortis 20 homoj post atako kontraŭ aŭtobuso veturanta nokte inter la niĝeria ĉefurbo Abuĝo kaj Port Harcourt. La pasaĝeroj estis unue prirabitaj sed, kiam la krimuloj kolere konstatis, ke iliaj viktimoj malmultan monon kaj aliajn posedaĵojn kunhavas, la rabistoj devigis ilin kuŝi sur la ŝoseo.

Korpopartoj

Alia buso, kies ŝoforo la viktimojn ja vidis, sed rabistojn timis, ne haltis, kaj surveturis la prirabitojn. La sekvan matenon, kiam venis la polico, videblis nur korpopartoj.

Pro similaj cirkonstancoj pereis pasintjare 60 pasaĝeroj survoje al la niĝeria komerca ĉefurbo Lagos.

Ankaŭ mi estis dum nokta busvojaĝo prirabita. Mi veturis inter Owerri, en la

orienta Niĝerio, kaj Abuĝo. La vojaĝo daŭras ĝis sep horojn sed, pro malbonaj ŝoseoj, ofte estas bezonataj 12 horoj (okaze de paneo eĉ du tagoj).

Vundis

Eniris la aŭtobuson rabistoj, kiuj prenis ĉion, kion ni posedis, kaj vundis la ŝoforon. Nun mi ne plu veturos nokte.

Niĝerianoj dependas de aŭtobusoj. Flugi tro multekostas kaj, malgraŭ milioj da dolaroj elspezitaj por plibonigi la fervojojn, transporto tia apenaŭ ekzistas. Krome, homoj preferas noktajn busojn: dum nokta vojaĝo eblas, almenaŭ teorie, dormi, kaj ne perdi labortagon.

Nun, pro la danĝeroj, kiuj ŝokis niĝerianojn, la registaro konsideras malpermesi noktan veturadon. Oni estu avertita: vizitantoj al Niĝerio nepre ne busvojaĝu nokte, nek pro aventuremo nek pro iu alia kialo.

Princo Henriko OGUINYE

ALBANIO

Tragedio en teatro

Fruaŭguste okazis incendio en hotelo apud la teatro *Skampa* en la urbo Elbasan, centre de Albanio. La incendion kaŭzis du laboristoj, uzante gason por veldi sur la teraso de la hotelo. Post dek minutoj la flamoj atingis la tegmenton de la teatro.

Modelo

Fajrobrigadistoj alvenis tro malfrue por savi la teatron, konstruitan en 1932 laŭ la modelo de *La Scala* en Milano.



USONO

Rio-granda stimulado

En nordaj regionoj de Meksiko pli akriĝas la tiel nomata „milito inter drokarteloj”. La vivo ĉi tie fariĝis danĝera por ordinariaj homoj, kiuj ofte elektas elmigri al la pli trankvila kaj leĝe stabila norda najbaro, Usono, aliborde de la rivero Rio Grande.

Ne ĉiuj, precipe malriĉuloj, laŭleĝe transiras la riveron. Pli riĉaj homoj penas kadre de la leĝaro setli ĉe la usona riverbordo kaj tien transloĝigi siajn familianojn.

Fabrikaĵoj

La usona registaro stimulas enmigradon, disdoninte ĝis 10 000 tiel nomatajn verdajn kartojn, kiuj permesas loĝi kaj labori en Usono. Multaj enmigrintoj starigas fabrikojn aŭ entreprenojn en regiono kun alta senlaboreco.

Ekzemple la registaro de la urbo McAllen, landlima urbo en Teksaso, bonvenigas enmigrintojn. Tiuj ne nur ekonomie sed ankaŭ kulture evoluigas la regionon.

AMik

Pro tio, ke la tragedio okazis somere, mortis neniu.

Albanoj ne serioze pritraktas la danĝeron de incendioj. Fajroestingiloj ofte ne funkcias, kaj oni ne scias, kion fari okaze de incendio. Antaŭ nelonge forbrulis domo kun bebo en lulilo, forgesita, dum hejmuloj eksteren fuĝis.

Bardhyl SELIMI

Incendio en la teatro Skampa kostis 1,5 milionojn da eŭroj.

MUZEJOJ

Verda vojo

Okaze de la 20-jariĝo de la muzeo pri la aŭstra pentristo kaj arkitekto Friedensreich Hundertwasser [fridenŝraifh hundertvasa] (1928-2000) estas malfermita ekspozicio, kiu ebligas persone ĝui la ideojn kaj viziojn de la artisto.

Meze de la ekspozicio, „Hundertwasser – la arto de verda vojo”, ĉe *Kunst-Haus Wien* („Arto-domo Vieno”), staras liaj artkampanjoj, pledo por harmonia kunvivado de homoj kun la naturo, kaj lia instruagado.

Citaĵoj

Ĉi tiun temaron ilustras gravaj verkoj de Hundertwasser akompane de fotoj el ĉiuj liaj kreaj periodoj, afiŝoj, aŭdregistraĵoj, videofragmentoj kaj citaĵoj de samtempuloj.

Ili prezentas intiman bildon de Hundertwasser kiel artisto kaj homo. 13 temĉapitroj sekvas la diversajn etapojn de lia krea agado ekde la unuaj verkoj fine de la 1940aj jaroj ĝis lia morto (MONATO 2000/7, p. 14).

En speciala sekcio la ekspozicio montras lian vojon de la arto al ekologio kaj ekologia engaĝo.

Naturo

Hundertwasser difinis sin „kuracisto” en la arkitekturo. Li pledis por la enigo de naturo en la arkitekturan spacon kaj kreis modelojn de multkoloraj konstruaĵfasadoj kun kurbaj linioj de iliaj fenestroj, verdaĵe ornamitaj.

Simplaj skizoj kaj surrealistaj bildoj atestas pri tiu celo, samkiel la „Arto-domo” mem, kiu estis konstruita en la



KUNSTHAUS WIEN W. SIMLINGER

Arto-domo Vieno.
Subĉiela vidaĵo.

sama stilo.

La ekspozicio realiĝis kunlabore kun la Hundertwasser-fondaĵo kaj helpo de pruntaĵoj de aliaj muzeoj kaj de privataj kolektantoj.

Evgeni GEORGIEV

NARKOTAĴOJ

El Paco al paco

Komence de aŭgusto la albana polico arestis narkotaĵo-baronon Giuseppe Simonelli, 32-jaraĝan. La itala polico jam arestis 16 membrojn de la grupo de Simonelli, konata kiel El Paco, sed li mem estis fuĝinta al Albanio.

Jam de jaroj restas Albanio, pro ŝtata malforto, oazo por mafianoj kaj aliaj krimuloj. Konate estas, ke tra la lando trapasas okcidenten ne nur narkotaĵoj, sed ankaŭ armiloj kaj ankaŭ homoj, inkluzive infanojn. Tamen ekde 2005 reduktiĝas trafikoj tiaj, kaj Albanio nun ne tiom gastigas mafianojn.

La bando de Simonelli, persekutata ankaŭ de kontraŭnarkotaĵaj instancoj en Usono, planis enporti 1600 kg da kokaino el Kolombio kaj Ekvadoro.

Bardhyl SELIMI



KUNSTHAUS WIEN

Friedensreich Hundertwasser:
Venu kaj promenu kun mi – dialogo, 1970 (pentraĵo).

Trajnojn trak-tante

Trajne traveturi Vienon? Tre malfacile! La aŭstra ĉefurbo disponas pri multe da finhaltejaj stacidomoj, kiuj ne estas efike interligitaj.

Ekde 2012 Vieno havos novan ĉefan kaj centran stacidomegon. El tiu la trajnoj veturos en ĉiuj direktoj, ligante diversajn urbojn: Parizo, Stutgarto, Dresdeno, Prago, Gdansko, Brno, Bratislavo, Budapeŝto, Venecio, Ateno kaj aliajn.

Parko

Jam antaŭ du jaroj oni malkonstruis la malnovan sud-orientan stacidomon kaj la poŝtcentron iom sude de la urbo-mezo. Sur la 109-hektarojn granda tereno estiĝos la nova ĉefa stacidomo, komerca kaj loĝa urboj, parko kaj lernejo por infanoj 6- ĝis 14-jaraĝaj.

La tuta tereno longos ses kilometrojn, konsistos el 100 km da trakoj, 300 trakforkoj kaj 10 kajoj. Fortransportos alvenintaj pasaĝeroj 17 trajn-, metrokaj bus-linioj en la 23 distriktojn de Vieno.

Miliardoj

Ĉirkaŭ la stacidomo loĝos 13 000 kaj laboros 20 000 homoj. La tuta projekto kostas 4 miliardojn da eŭroj kaj estas unu el la plej grandaj konstruejoj en la mondo.

Sude staras la plej alta ligna turo kun lifto en Eŭropo, el kiu oni povas panorame observi la progreson de la laborado. La apuda informejo nomiĝas *Bahnorama* el la germana „*Bahn*” (fervojo) kaj la finaĵo de panoramo.

Pliaj detaloj troveblas ĉe www.hauptbahnhof-wien.at en la germana kaj parte en la angla.

Walter KLAG

1. La panoramo-turo Bahnorama estas la plej alta ligna tia turo en Eŭropo
2. Modelo montras, kiel aspektos la nova stacidomego.
3. Jam staras la tegmento super la kajoj.

Fotoj: Walter Klag



1



2



3

Rekte interrete



Ĝis nun mi evitis trakti mian interretan laboron ĉe aparato en la propra hejmo. Mi ne volas, ke io ekstera eniru la privatan komputilon, timetas atakojn kaj spionadon, ne fidus al la promesata kaj krompagata protektado.

Sufiĉis al mi la libere alirebla uzado de komputiloj en mia laborloko kaj publika biblioteko. Nun, post definitiva forlaso de la deĵorejo, fariĝis iom malkomforte frekventi eksterdoman aparaton.

Dum jardekoj rezignante pri propra telefonkonekto, mia edzino antaŭ nelonge akiris poŝtelefonon kun kontrakto ĉe *Telekom*, la posteulo de la iama monopolisto Germana Federacia Poŝto. Mi ŝatus resti kun telefono plus interreto ĉe *Telekom*, ĉar mi ne volas tiun novan mondon kun brilaj budoj de diversaj telefonkompanioj en ĉiuj urbocentroj kun kria varbado kaj tarifoj daŭre ŝanĝiĝantaj, plej ofte ne travideblaj pro esceptoj kaj kaŝitaj informoj.

Tarifo

Bedaŭrinde ankaŭ *Telekom* inter-

tempe agadas kiel la konkurenculoj, ĝi ja havas la samajn klientojn, varbistojn, ĉefojn. Longe serĉinte pagindan tarifon ĉe la diversaj firmaoj, lastan fojon ni eniris pompan *Telekom*-vendejon, kie junulo gvidis nin kvazaŭ specialajn gastojn en la trankvilan duan etaĝon.

Tie ni nur volis ekscii la monatan koston por kune telefono kaj interreto. Ni jam sciis: ĉe *Telekom* 35 eŭroj monate, aliloke nur 25. Eble *Telekom* tamen havas pli moderan tarifon.

Sed la stabanoj tie tute ne reagis al nia simpla demando pri monata sumo, sed insistis, ke ni eksidu antaŭ grandega ekrano, kaj demandis mem, kiajn televidajn programojn ni nuntempe rigardas kaj kion ni estontece en la plej bona cifereca kvalito volus spekti. Kaj ili tranklakis sen atendi respondon, kion proponis tiu aparato.

Tro longe mi ne kapablas afablumi, do mi insistis pri mia demando, sen ia ligo al televidado. Tuj ili diris: „Antaŭe ni kontrolas, ĉu la nova televida servo estas ricevebla ĉe vi.” Kaj ili konstatis,

ke la instalaĵoj mankas kaj ke ne estas konkretaj planoj por alkonduki ilin. Post duonhoro ili nur flanke konfirmis la sumon, kiun mi jam konis – 35 eŭroj monate.

Transiro

Kontraŭvole ni decidis transiri al firmao kun 25-eŭra oferto sen pluso aŭ minuso dum la daŭro de du jaroj. Laŭ informo de *Telekom*, ni havas la rajton je eliro el la kuranta kontrakto ĉiam post unu monato.

Tamen la nova firmao eksciis, kion ni ne sciis: ke ni fakte estas en kontrakto, kiu daŭras ankoraŭ duonjaron. Kaj plua strangaĵo okazis. Venis telefonalkvoko el iu fora *Telekom*-servocentro kaj afabla vira voĉo demandis pri la kialoj de nia forlasemo.

Filozofiumado

Mi ja vane eksplikis al li, ke al mi tute sufiĉus unu firmao, kaj tiu estu *Telekom*. Sed sciante, ke mi ne povas instalii pli travideblan mondon, mi finis mian filozofiumadon kaj klarigis, ke malhelpas la restadon la tro alta *Telekom*-tarifo.

La monata diferenco estas 10 eŭroj, do 120 jare. Mi ĉiam ankoraŭ kontrolas miajn elspezojn laŭ la (duoble pli alta) sumo en germanaj markoj, kio sobrigas kaj reduktas la elspezemon. Konkrete, per tiuj nenecesaj 240 markoj mi bone povas pagi plurajn Esperanto-gazetojn. Pri Esperanto mi memkompreneble nenion menciis.

Miraklo

Tamen okazis miraklo. Ĉiam antaŭe mi legis kaj aŭdis nur pri la 35-eŭra baztarifo, senescepte en ĉiuj *Telekom*-informadoj. Sed nun la digna sinjoro preskaŭ konfidis al mi, ke li, kaj nur li, en tiu ĉi situacio povas oferti al mi specialan tarifon, nome 30 eŭroj monate por du jaroj.

Tiu sekretumado de firmao kvazaŭ institucio mirigis, sed samtempe forte impresis min, tuŝis mian koron. Mondfirmao moviĝas por mi, kreas apartan

tarifon, nekredeble. Nu, tion mi volis honori, eĉ se la prezo ne estis la konkurenca.

Tamen mi volis scii, ĉu eblas eliri el la kontrakto. „Jes,” venis la respondo, „skribu ene de du semajnoj al la alia firmao, ke vi nuligas la kontrakton, kaj vi estos libera.”

„Bone,” mi diris al mi, „mi skribos kaj portos la leteron al la budo, kie mi subskribis.” Subite la tono de la vendisto akriĝis: „Ĉu vi fakte subskribis en vendejo, ne ĉeporde?” Kaj en tiu ĉi momento vaporigis la eblo reveni al *Telekom*.

Respondo

„Se vi ne domporde negocis, se vi subskribis en vendejo, vi plene memvole kaj konscie agis. Vi do ne havas la rajton aboli la kontrakton.” Mi demandis, ĉu la aktuala interparolado estas vana. „Estas tiel”, venis la respondo. Kaj ni afable adiaŭis.

La penoj akiri endoman interretan aliron ne finiĝis. Aperis strangaj anoncoj pri la ŝanĝodato, la modemo ne alvenis, la instalado devos okazi. Kaj poste mi sidados sola kun sekurecaj problemoj kaj jam konataj malregulaĵoj.

Retaliro

Almenaŭ nova komputileto sole por interretaj aferoj jam atendas. La granda mondo baldaŭ kapablos rekte eniri nian hejmon. Sed ĝi ne eniros la privatajn dokumentojn en alia loko. Mi ja sopiretas retaliro pli apudan, por ne plu forlasi la domon por vidi kaj sendi mesaĝojn.

Sed mi scias, ke mi perdos privatecon kaj sendependecon. Konsolas min, ke la entrepreno plifaciligas, eble eĉ intensigas la kontakton kun MONATO, kun miaj karaj ĉefredaktoro, redakcia sekretario kaj redaktoroj de *Arto* ĝis *Turismo*.

Sed same maltrankviligas min la penso, ke estontece mi – kaj aparte ili – devas timi, ke la senpera interligiĝado inspiras kaj stimulas ne nur konstantan fluon de ideoj, sed ankaŭ konstantan fluon forme de artikoloj pro kaj pere de la tuja transdoneblo interreta.

Franz-Georg RÖSSLER

PUBLIKA TRANSPORTO

Bileto al kontraŭleĝeco

En periodo, kiel la nuntempa, de „malgrasaj bovinoj”, oni certe malemas akcepti pliigon je 50 % de la prezo de publika transporto.

Tio tamen okazis tuj post la somero en Milano, Italio, kies nova urbestro Giuliano Pisapia (maldekstrulo) tiele dispoziciis por replenigi – post plurjara dekstrula administrado – la komunan kason.

Paradokse estas, ke en Italio, dum la maldekstro streĉas sian rimemon, la dekstro fariĝis abrupte solidarega.

Tradicie

Por eviti la prezaltigon, la ekstremdekstra, secesia partio *Lega Nord*, kiu

tradicie volas apartigi bone funkciantan kaj „honestan” nordon disde misfunkcia kaj „impostevitanta” sudo, proponis dividi – kontraŭleĝe – biletojn kun aliaj veturantoj.

En Milano, kiel en la plimulto de la italaj urboj, oni rajtas utiligi la saman bileton dum 90 minutoj. *Lega Nord*, tamen, metos ĉe ĉiu haltejo keston, kie pasaĝeroj povos lasi (kaj preni) biletojn ankoraŭ validajn.

La iniciaton oni nomas *ticket-crossing*, aŭ bileto-krucado, laŭ la angla *book-crossing*, aŭ libro-krucado. Temas pri movado tutmonda kun celo senpage transdoni librojn al aliaj, kaj precipe nekonataj, legantoj.

Roberto PIGRO



Transdoni bileton de unu pasaĝero al alia ne permesatas – sed tion proponis dekstrema politika partio.

SPORTO

Pilka pasio

En Litovio ŝajne nenio alia estas tiel grava kaj emociiga kiel korbopilado – almenaŭ depost 1939, kiam en Kaunas renkontiĝis en novkonstruita sporthalo teamoj el ok landoj de Eŭropo.

Venkis litovoj, kaj la sporto fariĝis la plej grava varmarko de Litovio. Du fojojn antaŭ la sovetia reĝimo teamoj de Litovio ornamigis per oraj medaloj kaj unu fojon, en 2003, en Stokholmo. Freneza pasio, la malfacila historio de la lando kaj venkaj tradicioj kaŭzis, ke korbopilado okupas esceptan lokon en la vivo de la litova popolo.

Tamen nepris atendi 72 jarojn, ĝis okazis denove internacia korbopilada ĉampioneco en Litovio. Ĉi-septembre la lando organizis la 37an Eŭropan Korbo-



Korbopilado furoras en Litovio – aparte dum enlanda internacia ĉampioneco.



Dekmiloj da homoj surstratiĝis por bonvenigi la ĉampionecon.



Televidoture brilas granda korbo.

pilkadan Virĉampionecon. Ĝin partoprenis 24 landoj, apartenantaj al la Eŭropa Federacio de Korbopilado.

Torĉo

Ok semajnojn antaŭ la ĉampioneco okazis diversaj ceremonioj. Kvazaŭ olimpika torĉo, korbopilko dum tiuj semajnoj trapasis tutan Litovion. La pilko estis man-al-mane transdonata kaj, vizitante pli ol 60 urbojn kaj vilaĝojn, vojaĝis pli ol 2500 kilometrojn.

Dum la inaŭguro de la ĉampioneco en ses urboj de Litovio – Klaipėda, Panevėžys, Šiauliai, Alytus, Kaunas kaj Vilnius – surstratiĝis 61 000 adeptoj, kiuj samtempe senpaŭze dum kvin minutoj pilkludis. Jen, ŝajne, rekordo. Krome, 170 metrojn alte, ĉe la televida turo en Vilnius, brilas granda korbo, lumigata de 545 lampetoj, kaj klare videbla de multaj lokoj en la urbo.

GREKIO-ALBANIO

Ĉe la limoj de pacienco



BARDHYL SELIMI

Longe atendis la albanoj ĉi-somere ĉe la landlimo kun Grekio. Pli ol 12 horojn restis „difektitaj” komputiloj de grekaj doganistoj. Multajn kilometrojn etendiĝis la vicoj de aŭtoj ambaŭflanke de la landlimpunktoj albanaj-grekaj en Kakavija, Kapshtica, Qaf Bota kaj Tri Urat.

Ĉe albanaj doganejoj perfekte funkcii komputiloj. Malfermitaj estis sufiĉe da ĝiĉetoj, kontraste al nur tri grekflanke. Varmegis, apudis nenia restoracio aŭ akvofonto, videblis nur montoj kaj asfalto. Atendis vane dekmiloj da buspasaĝeroj kaj aŭtoveturantoj.

Strikis

Dekmiloj da vojaĝantoj senprobleme trapasas landlimpunktojn inter Albanio kaj Kosovo aŭ Makedonio. Tamen kristnaske kaj paske jam en la pasinteco „difektiĝis” grekaj landlimaj komputiloj. Ankaŭ strikis grekaj doganistoj.

La albanoj opinias, ke tio estas fiintenca ago flanke de grekaj aŭtoritatoj. Tiuj ne volas, ke albanoj revenu hejmen por tie elspezi sian monon.

Bardhyl SELIMI

Kiam montopado fariĝis mortopado



Kurt Albert

La 26an de septembro pasintjare la profesia grimpisto Kurt Albert gvidis grimpemulojn tra la rokoj de la dratsekurigita grimpovojo *Höhen-glücksteig* (Altfeliĉa montopado) en la t.n. Frankonia Svisujo oriente de Nurenbergo, Germanio.

Ĉirkaŭ la tagmezo, ankoraŭ proksime al la komenciĝo, li falis de la roka krutaĵo kaj, 20 metrojn pli sube, surfunde frakasiĝis lia kapo. Helikoptere transportite al speciala malsanulejo en Erlangen, li mortis tie du tagojn poste.

La mortfalego ŝokis grimpistojn kaj grimpemulojn ne nur loke, sed mondvaste. Kurt Albert, naskiĝinta en 1954 en Nurenbergo, apartenis al la malgranda elito de eminentaj grimpistoj. Per siaj talento, kuraĝo, novemo, sukceso kaj varmkora personeco li estis forte impresanta kaj influanta la montoadeptojn ĉie en la mondo.

Ruĝpunkta grimpado

Kun la palatinatano Wolfgang Güllich, mortinta jam en 1992 pro aŭtoakcidento aĝe de 31 jaroj, li transformis la tiam aktualan „teknikan grimpadon”, kio signifas konkeri monton per ĉiuj uzeblaj helpiloj, en pli naturan, pli malpezan, pli elegantan, sed ankaŭ pli defian stilon.

vojon per ruĝa punkto – signo de fiero kaj invito al imitado. Tiel li kreis la „ruĝpunktan grimpadon”, ĝis hodiaŭ sinonimon por pureca, samtempe altgrade malfacila grimpmetodo.

Ĝis la ekstremaj limoj de la malfacileco li serĉis sinrealigon en longaj ekspedicioj tra maroj, neĝo, praarbaroj kaj dezertoj por kroni ilin per unikaj grimpadoj ĉe montoj kaj rokoj ie transe de la loĝata mondo. Tian vivon li daŭre volis vivi, scivoleme kaj libere. Tamen li akcidentis ne pro aventuro aŭ rekordemo en la mortiga zono ie inter ĉielo kaj tero, sed en la hejma regiono inter rokoj por li bone konataj kaj normale tute senproblemaj.

Kialoj

La publiko ne multe eksciis pri la mortiga kialo. Sed la tagon antaŭe Albert sola aŭtis de Gasseldorf, lia loĝloko en la regiono de Nurenbergo, al Hamburgo por prezenti vojaĝprelegon. Reveturante ankoraŭ en la sama nokto, li povis atingi la hejmvilaĝon nur frumatene. Verŝajne ankaŭ tie li ne povis dormi, ĉar atendis lin la menciita grupogvidado distance de pli ol unuhora aŭtoveturado.

Povas esti, ke li ne kontentige nutris sin, kaj la rokoj estis glitigaj post pluvo. Ne estas mirige, ke en tia situacio eble li iomete malatentis, malĝuste reagis, eĉ

suferis sekunderan senkonsciiĝon. Ĉi-punkte enplektiĝis la fato. En malfacilaj krutaĵoj li plej ofte grimpis kun sekurigaj partneroj. Ĉe la por li facila *Altfeliĉa montopado* li ne bezonis partneron. Li konis tie ĉiujn mantenilojn, piedapogilojn.

Krome ekzistas dratkablo por sekurigi sin mem. Albert ja surhavis sian sekurigan zonon, sed ne estis fiksinta sin en la falomalhelpan drategon ĉe la roko. Tie profesio kiel li ne devas timi falegon. Tamen li deglitis kaj falegis detruige. La sekvintaj grupanoj ne rimarkis emocion ĉe li, ne aŭdis krion. Laŭ la medicinistoj li almenaŭ ne devis suferi dum la du tagoj ĝis la morto.

Ceremonio

La parencoj enterigis lin private, kaj la grimpoamikoj adiaŭis lin ĉe la Konkofonto apud la Glat Muro, kiun Albert kun plezuro kapablis tragrimpi senhel-pile-senprobleme. La ceremonio, en kiu parolis memorige pluraj kolegoj liaj, pa-sis solene kaj digne. La etoso ne kroĉiĝis al la pasinteco.

Inter komentoj afliktiĝaj kaj dankemaj iuj adeptoj eĉ aŭguris novajn heroaĵojn en transa montomondo, ekzemple: „Tie vi denove kune kun Wolfgang (Güllich) grimpos aŭdacajn vojojn, kiujn ni tute ne povas imagi tie ĉi.” Legendulo Kurt Albert jam estis fariĝinta dumvive. Lia personeco, liaj mirindaj atingoj, lia subita nekomprenebla morto garantios al li daŭran estiman memoron ankaŭ en estontaj grimpogeneracioj.

Franz-Georg RÖSSLER

Riĉa tero, malriĉa popolo

En la jaro 1922 la aŭstro Ernest Nowack desegnis la unuan geologian mapon de Albanio je skalo 1/200 000. Tiel li malkovris la areojn enhavantajn nafton en la regiono Vlore-Berat kaj la mineralojn en la regiono Mirdite-Puke.

Poste italaj kompanioj komencis ekspluati diversajn minejojn. Post la dua mondmilito la ŝtato kreis geologian servon kun vasta reto da laboratorioj, esplorantoj kaj institutoj kaj fondis la geologian fakultaton ĉe la tirana universitato.

Historie la unua mineralo ekspluatita en la lando estis bitumo. En Selenica troviĝas dumiljara minejo de tre bonkvalita bitumo, kiu estis uzata i.a. por pavimi la bulvarojn de eŭropaj ĉefurboj, kaj eĉ tiujn de Tokio kaj Pjongjango.

Dum la komunisma reĝimo mineraloj estis la ĉefa fonto por „trarompi la blokadon” kaj certigi al si valuton. Tiu-periodo la minejoj estis ege sed malzorge ekspluatitaj. Ekzemple estis venditaj ĉirkaŭ 33 milionoj da tunoj da kromio.

Post la jaro 1990 la ŝtato de la minejoj estis mizera kaj preskaŭ ĉiuj fermiĝis. Nur dum la lastaj dek jaroj revekiĝis la intereso de la eksterlandaj kompanioj por ricevi minejajn koncesiojn, des pli ĉar jam ekzistas pretaj studoj pri la disvastiĝo de la mineraloj.

Elitaj mineraloj

Kromio troviĝas koncentrite en kelkaj areoj (Bulqize, Tropoje, Kukës, Lure kaj Pogradec). Ĝi estas sufiĉe bonkvalita kaj la merkato estas certa. La transporto okazas tra la marhaveno de Durrës. Kie estas kromio troviĝas ankaŭ kupro. Koncentrite ĉefe en la nord-oriento de la lando, la kupraj rezervoj atingas 20 milionojn da tunoj. Kun la kupro estas ligita ankaŭ oro kaj arĝento, en kelkaj areoj (Gurth,

Munelle, Qafe Bari) ĝis 5 gramoj je tuno.

Mineraloj por industrio kaj konstruado

Fakuloj taksas je 213 milionoj da tunoj la rezervojn de feronikelo (alojo de fero kaj nikelo) kaj je 103 milionoj da tunoj por nikelo-silikato. Post 20 jaroj da silento diversaj kompanioj (i.a. granda turka kompanio en Elbasan) ekinteresiĝas pri ĝi. Oni povas vidi la grandkvantajn stokojn de feronikelo en la eksa minejo de Prenjas.

Aldoniĝas la kalkaj rokoj kaŝantaj bazajn konstrumaterialojn kiel kalko kaj cemento. Estas ĉirkaŭ 500 milionoj da tunoj tiaj. Tri eksterlandaj kompanioj jam ekspluatas ilin en la regiono inter Kruja kaj Laço. Dekoraciaj platoj kaj ŝtonoj troviĝas abunde tra la lando. Oni eĉ malkovris rarajn fosforeskajn ŝtonojn bonkvalitajn.

La karbo servas por pluraj termocentraloj konstruitaj kaj konstruataj. Aparte la karbo de Krraba kaj Memaliaj estas je kvalito ene de internaciaj normoj. Entute la aktualaj rezervoj atingas 712 milionojn da tunoj.

Granda prisana problemo

Ekestis danĝero pro radioaktiveco en kelkaj regionoj inkluzive de la ĉefurbo pro la grandaj stokoj de mineraloj kaj pro la uzado de radioaktiva fero por konstruado aĉetita malmultekoste en Ukrainio. La nivelo de la kancerofara radongaso du- ĝis tri-obliĝis. Rezulte pliiĝis la nombro de homoj trafita de kancero en

Tirano, Koplik, Pogradec, Bajram Curr kaj aliaj minejaj areoj.

Likvaj resursoj

Albanio flosas sur nafto kaj dolĉa akvo. Laŭ UN-raporto, en la mondo 66 % de la akvo ekspluatigas por la agrikulturo, 20 % por familioj, 10 % por industrio kaj 4 % elvaporigas. En Albanio nur 20 % ekspluatigas, la cetero fluas en la maron.

Nafto troviĝas ne nur ene de la lando sed ankaŭ en la maro. Multaj kompanioj serĉas kaj ekspluatas ĝin. La lastjara produktado estis ĉirkaŭ unu miliono da tunoj. Tio estas multe sub la plej alta cifero de 2,1 milionoj atingita en la jaro 1974. Restas ankoraŭ rezervoj je 387 milionoj. En la suda regiono troviĝas ĉirkaŭ 320 milionoj da kubaj metroj da gaso.

Nudpiede sur ora tero

Kvankam la lando estas riĉa je mineraloj la vivnivelo estas ankoraŭ relative malalta. Ĉirkaŭ 80 % de la loĝantaro de la minejaj areoj estas malriĉaj. Pro tio plioftiĝas la protestoj kaj strikoj fare de ministoj kaj iliaj familioj. La kompanioj promesis investi pli ol 20 milionoj da eŭroj sed faris preskaŭ nenion.

En Bulqiza, kie iam agadis la itala kompanio Darfo kaj aktuale la rusa-aŭstra kompanio ACR (Albana Kromio), pro malbonaj laborkondiĉoj estas mortakcidentitaj kelkdek ministoj. Fine de julio 2011 13 ministoj komencis malsatstriki en galerio je profundo de pli ol 1000 metroj. La loĝantoj blokadis la nacian vojon multajn horojn. Necesas la interveno de la ŝtataj organoj, sed ankaŭ ĉe altaj tieaj niveloj ekzistas notinda korupto.

Bardhyl SELIMI

Ne pagi por ne ŝuldi

Malfacilas por la hispanaj publikaj administracioj pruntepreni monon. Ne temas plu pri la kreditokrizo komenciĝinta en septembro 2008, sed ĉefe pri la rezultoj de la sekva longedaŭra recesio kombine kun la limigoj de la eŭrozonaj aŭtoritatoj, kiuj malpermesas al publikaj administracioj peti novajn bankokreditojn. Rezulte, la publikaj administracioj malfruigas siajn pagojn: kvankam leĝo devigas ilin pagi ne pli malfrue ol post 50 tagoj, mezume tio okazas post 157 tagoj. Estas kaŝaj kreditoj por nedifinita daŭro je la kosto de la liverantoj.

La koncernaj monkvantoj estas enormaj: entute pli ol 50 miliardoj da eŭroj da nepagitaj fakturoj, 5 % de la malneta enlanda produkto. En marto 2009 estis 12,3 miliardoj: kvarobliĝo en iom pli ol du jaroj. Laŭ diversaj entreprenistaj asocioj la pagoprokrastoj sumas je 15 miliardoj por publikaj laboroj, 10 miliardoj por unuopaj entreprenistoj, 5,5 miliardoj por la farmacia sektoro, 4 miliardoj por la rubokolekto, 1 miliardo por purigo-firmaoj ktp.

Malfruoj

Plej malfruas en la pagoj la loka administracio. Laŭ la konstru-entreprenistoj magistratoj averaĝe pagas post 238 tagoj, la aŭtonomaj komunumoj post 155 kaj la centra registaro post 140. Ĝuste la magistratoj frontas la plej grandajn malfacilaĵojn pro leĝa malpermeso akiri pliajn ŝuldojn.

Sed tiuj prokrastoj estas malgrandegaj kompare kun aliaj sektoroj. La farmaciaj laboratorioj mezume enspezas post 432 tagoj. „Ni ĝissate lacas financi la aŭtonomajn komunumojn”, plendas proparolanto de tiu sektoro, por kiu la ŝuldoj de la administracioj kreskis de 5,2 al 5,45 miliardoj da eŭroj nur inter marto kaj junio.

Tiuj malfruoj tuŝas eĉ normalajn civitanojn, kiuj ankaŭ fariĝas bankoj de siaj regantoj. Ekzemple, kiam katalunaj

gepatroj pretigas la petojn por lernejaj stipendioj de siaj gefiloj por la nova kursojaro 2011/2012, kelkaj ankoraŭ ne ricevis la promesitan monon por tiu de 2009/2010!

Strikoj

Kompreneble, entreprenistaj asocioj organizas komunajn agojn por kontraŭstari la senĝenecon de la administracioj. Tiel en aŭgusto 2011 700 apotekoj fermiĝis unu tagon en la regiono Kastilio-Manĉo por postuli al la regiona registaro la pagon de 125 milionoj da eŭroj da kuraciloj.

La respondo de la regiona ministro pri sano estis tranĉa: „La kaso malplenas, mono ne estas. Se vi deziras ricevi la monon, procesu.” Ĉar justico estas eĉ pli malrapida ol la pagoj de la administracio, la apotekistoj minacis per dumonata fermo ekde septembro.

Pago-renverso

Ankaŭ aliaj sektoroj organiziĝas. Ekzemple, en septembro 2010 la koncesiuloj pri purigado de Madrido minacis la urbestron pri nepago de la salajroj de siaj 12 000 laboristoj pro 289-miliona ŝuldo. Fine estiĝis interkonsento sub la formo de angla-hispana modvortaĉo: *confirming*. Temas pri financa operacio, en kiu banko fruigas la pagon de la ŝuldo, kondiĉe ke la senespera liveranto ak-

ceptu pagi la interezojn. Simile komune agis en aŭgusto 2010 la kvin valencilandaj universitatoj. Tiam la regiona registaro jam du monatojn prokrastis la pagojn de po 67 milionoj da eŭroj da salajroj.

Tamen la entreprenoj, kontraste al la administracio, ne povas prokrasti siajn pagojn. Dudeko da malgrandaj entreprenoj liveras kirurgian materialon al hospitaloj de la murcia aŭtonoma komunumo. Ties registaro ŝuldas al ili 800 milionojn da eŭroj ekde 2009. „La situacio estas drama: la bankoj ne donas krediton, kaj ni devas pagi la aldonvaloran imposton, kvankam ni ne enspezas. En septembro pluraj kolegoj fermos”, plendas unu el tiuj entreprenistoj, estro de dek-laborista firmao.

Dramaj konsekvencoj

Plej drama la situacio estas por la malgrandaj entreprenistoj, kiuj havas malpli da financaj kapabloj kaj malpli da forto por premi la administracion. Ĉe-kape elstaras pli ol tri milionoj da unuopulaj entreprenistoj. La magistratoj prokrastas iliajn pagojn dum mezume 296 tagoj. Ekde septembro 2008 pli ol 300 000 unuopuloj devis ĉesi siajn agadojn. „La administracio ruinigas nin. La estonto estas deprima”, ekkriis la prezidanto de la ĉefa asocio de la sektoro.

Hektor ALOS | FONT



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

Mafio plu klarigenda

La nocio *mafio* elvokas intereson pro la efiko, kiu rezultas de la pluraj aventuraj libroj kaj filmoj, unuavice „La baptopatro” – romano de Mario Puzo kaj filmo fare de Francis Coppola. Laŭ aserto de la aŭtoro de la libro, tiaspecaj verkoj elvokis eĉ timon ĉe turistoj, kiuj hezitas viziti Sicilion. Celo de la poŝlibreto, eldonita en kelkaj lingvoj samtempe, estas forigi tiun timon kaj objekte klarigi al turistoj, kio ja vere estas la sicilia mafio kaj aliaj parencaj krimorganizaĵoj.


Celo plenumita

La aŭtoro konstruas la tekston en formo de respondoj al la demandoj, kiujn, laŭ lia aserto, plej ofte starigas scivolaj homoj. Al la respondoj helpas aldonaj utilaj klarigoj, kiujn faris en formo de piednotoj la tradukintoj. La respondoj estas precizaj, klaraj kaj bone vortumitaj, kaj la ĉefa celo de la libro estas plenumita: la leganto ricevas ĝeneralan imagon pri tio, kio estas la sicilia mafio, kaj kion ĝi similas en aliaj regionoj de Italio kaj en aliaj landoj de la mondo.

Estas klarigite, ke mafio principe ne estas kaj neniam estis „bona”, sed ĉiam estis krima kaj senmorala organize, malgraŭ tio, ke dum 150 jaroj de sia ekzisto ĝi grave evoluis kune kun evoluo de la socio kaj ŝtataj institucioj, en kiujn ĝi ĉiam penis integriĝi. Krome, kaj tre grave, por tiuj homoj, kiuj opinias, ke Sicilio elvokas timon pro ekzisto tie de la mafio, estas bone montrite, ke al turistoj kaj aliaj vizitantoj ĝi tute ne danĝeras, kaj siciliaj urboj estas eĉ signife malpli danĝeraj ol grandaj metro-poloj kiel Novjorko, Londono kaj aliaj.

Tro konciza

Tamen, la libreto havas unu gravan mankon: la koncizecon. Pro ĝi restas ne



klaraj aŭ nur menciitaj pluraj problemoj, kiuj interesas la leganton. Ekzemple, tiaj demandoj, kiel historiaj radikoj de la fenomeno mafio, rilatoj de la *mafio* kun faŝisma reĝimo kaj kun aliancanoj dum la dua mondmilito, nuntempa influo de la *mafio* al la aktuala politiko ktp estas signitaj nur per po unu-du frazoj. Jes, en la libro estas referencoj al diversaj profundaj historiaj kaj sociologiaj esploroj, sed la fontoj ekzistas ĉefe en la itala lingvo kaj apenaŭ facile atingeblas al leganto, ne posedanta tiun lingvon. Do la scivolo de la leganto pri pli profunda kompreno estas ne saturita.


Pro tio mi, kiu ja pli frue jam interesiĝis pri la afero, eksciis ne multon novan – sed ja mi ne estas sola homo, kiu volus ekscii pri tio ĝuste de la italoj, kiuj spertis ekziston de mafio kaj batalon kontraŭ ĝi pli longe ol ĉiuj ceteraj popoloj. Tial mi plu revas pri apero en Esperanto de pli ampleksa, detala kaj profunda libro pri mafio, verkita de la sama aŭ alia serioza itala aŭtoro.

Nikolao GUDSKOV

Augusto Cavadi: *Mafio klarigata al turistoj*. Tradukis el la itala, printis kaj adaptis Michela Lipari kaj Carlo Minnaja, antaŭparolo de Giuliano Turone. Eld. Di giloramo, Trapani, 2011. 53 paĝoj, gluita. ISBN 978-88-87778-99-1.

Prezo ĉe FEL: 6,25 eŭroj + afranko

Sciencfikcia verko iom leginda



Kvankam ne granda parto de nia literaturo, sciencfikciaj verkoj ne mankas. Ĉi tiu nelonga verko, efektive novelo, povus interesi legantojn de tiu literatura fako.

La temo estas iom komplika: raportisto iras al Meksiko por intervui Trocki-n, dum okazis klopodo murdi tiun famulon. Mistera persono informas la raportiston, ke, tamen, ja eblas fari la intervjuon, malgraŭ la morto de Trocki. Dum longa, stranga, vojaĝo la raportisto informiĝas, ke la DNA de Trocki estis elprenita, purigita kaj povus esti metita en alian personon, tiel ke la personeco de Trocki reenkarniĝus.

Tamen tragedio, kiam ili renkontas

„hoga”-n, fiaskas la entrepreno. „Hoga” estas monstra kvazaŭfiŝo, pri kiu estas bildo kaj diskuto fine de la novelo.

La gramatika karaktero de la traduko estas ofte nekontentiga, kaj ne mankas komposteraroj.

Mi mem ne multe ĝuis la rakonton, tamen pri gustoj oni ne diskutu.

Donald Broadribb

Jonas Lenn: *La karna maŭzoleo*. El la franca tradukis Emmanuel Desbrière, Florence Desbrière, Ginette Martin, kun helpo de Saliko. Eld. La Arĝenta Ŝlosilo (*La Clef d'Argent*), Aiglepierre, 2010. 48 paĝoj, gluita. ISBN 978-2-908254-83-9.



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 € +
afranko (tradicia bindita
versio), 14,40 € (ePub aŭ
Mobipocket).

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Solvo de la duobla laboro (Monato 07/2011)

Karaj solvintoj, kompreneble ne estis la celo ke la duobla laboro rezultigas la solvon HOLOGRAMOJJ kun duobla J. Restus nur unu jo se mi nur menciis “frato” anstataŭ “fratoj” en la unua enigmo. Kiel ajn, 3 legantoj ĝojos pri libropremio, nome Grimley Evans (Britio), Janine Dumoulin (Francio) kaj Sonja Brun (Svisio). Gratulojn.

JPVDD



	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	P	R	A	H	I	S	T	O	R	I
2	R	U	Z	I		T	O	L	A	N
3	E	L		E	P	O	S	E		D
4	L	U	N	N	O	K	T	O		I
5	U		E	O	L	O		S	E	G
6	D	U	R		O	N	I		E	N
7	O		V	A			D	I	R	I
8		M	O	N	A	V	A	R	A	
9		A	Z	E	N	O		E		A
10	F	R	A	T	O	J		J	O	D


	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	S	A	N	H	E	L	P	A	J	N
2		K	U	L	O		O	S		U
3	A	L	T		N	A	R		A	R
4	R	A	R		O		D	A	M	
5	O	M	A	M		K		L	I	G
6	K	O	R	A	T	A	K	O		A
7	I			A	E	R	O		I	S
8		M	E	T	R	O	J	N		T
9	V	O	L	O	P	O	N	O	D	O
10	I	N	O	J		J	E	J	U	N

Silaba enigmo

En la figuro de ĉi tiu enigmo devas troviĝi jenaj silaboj:

A - AŬ - AŬ - BO - BRO - CE - DO - DO - DRO - FA - GA - LA - LE - MA -
MAN - MO - NO - O - PA - PO - POR - RA - RO - RO - RO - SA - SKO -
ŜU - TE - TO - TO - ZO

Adamo Ząbek, Pollando



Horizontale

1. periodo, stato en evoluo/festado okaze de ekz. geedziĝo
2. speco de malgranda lacerto
3. planedo sur kiu ni vivas
4. ampleksa perspektivo de pejzaĝo
5. arbareto
6. maŝino memmoviĝanta
7. ĝi impresas flarsenton/apenaŭ videbla trueto en haŭto

Vertikale

1. fronto de konstruaĵo/tropika serpento
2. franca verkisto, aŭtoro de “Nana”/ printempa kristfestoj
3. kemia elemento, malmola fragila metalo/migreno
4. granda ĉiamverda arbo libana/ priskribo en gazeto
5. ĉefa ideo en diskuto/en atlaso
6. maldika libreto/verkisto

anoncetoj

Interreta kurso pri kvakerismo Religio sendogma kaj senrita – ĉar kvakeroj kredas ke la tuta vivo estas sakramenta kaj ke ĉiuj tagoj kaj ĉiuj ejoj estas egale sanktaj. De 350 jaroj kvakeroj kunvenas en silento, en la fido ke al ĉiu homo eblas senpere ricevi inspiron el la dia fonto. La kurso – en Esperanto, senpaga – baziĝas sur grupdiskutoj pri kvakeraj tekstoj. Kvakera Esperanto-Societo.

Rete: noos.ch/kes -> „novaĵoj”.

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo “Knajpo”. Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

“Naturista Vivo”, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



La Origino de Specioj

Karolo Darvino



Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, La Origino de Specioj restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be

prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi aŭ PDF).